# Kiamaniere amatoroj fortiĝu? (Unua parto) {Rekomendo de USIKUBO 9p}

Mi pensas se amatoroj volas plifortiĝi, pli bone estu instruata de bona instruisto. Bona instruisto devas esti forta. En go-ludo oni ŝanceliĝas. En studado oni diverse ŝanceliĝas. Forta instruisto klare gvidas studantojn. Kaj studantoj povas kredi fortan instruiston.

Laŭ mia sperto, ĝis la 6a jaro de elementa lernejo, mi estis instruita de plej fortaj amatoroj en KOUTI gubernio {高知 県}. Poste, kiam mi venis al OOSAKA {大阪} kaj fariĝis Kandidato por Profesiulo {院生}, mi estis surprizita, ke profesiuloj tute alimaniere pripensas pri lud-maniero de goo.

Antaŭe mi estis instruita, ke goo estas ludo por okupi teritorion. "En formaciado formaciu por grande ĉirkaŭi teritorion." "Unue singardu." "Memoru batalmodelojn."

Kandidatoj por Profesiulo ne rigardas 'batalmodelon' kiel fiksita procedo. Laŭ la situacio en ludo, ili devas cerbumi plej bonajn ŝtonmetojn. Tute diferencis la pensmanieron, "Goo estas ludo por batali." Do, en formaciado oni formacias por avantaĝo en posta batalo.

Ĉi tio estas ekzemplo de la diferenco inter amatoro kaj profesiulo, aŭ ke nur fortaj instruistoj povas gvidi lernatojn vere fortiĝi.

Nuntempe mi mem instruadas kelkajn amatorojn. Bedaŭrinde mi ne estas plej forta profesiulo kaj ne estus bona instruisto. Tamen ekzistas lernanto, kiu lerte instruiĝas. Ĉi tiu estas obeema lernanto. Kiel jam skribis, se instruisto estas vere forta, ĉiuj lernantoj devus obei la instruistajn vortojn. Do estus mia kulpo, ke iuj lernantoj ne estas obeemaj.

Kiom diferecas inter fortoj de profesiulo kaj amatoro? Se profesiluo serioze volus venki iu amatoron, kiu nun estas instruita kun 4 anticipe-metitaj ŝtonoj, kiom da pluaj anticipe-metistaj ŝtonoj necesas por la amatoro eviti malvenkon.

Onidire, iam, amatore 6a DANNa 'majstoro' en societo de literturaj verkistoj ludis goon kontraŭ TYOU TiKun {趙治勲; japane legenda majstro kiu devenis de Koreio} kun 8 anticipe-metitaj ŝtonoj, sed mizere malvenkis.

Nuntempe, forteca nivelo de amatoraj goisto altiĝas. Tamen amatoroj ofte volus ludi kun malmultaj anticipe-metitaj ŝtonoj. Ekzemple, iu amatoro, kiu estas instruita kun 4 anticipe-metitaj ŝtonoj, se la instruanta profesiulo serioze ludas kvazaŭ en inter-profesilula matĉo, bezonas 6 anticipe-metitaj ŝtonojn. Eble, se kun 7 anticipe-metitaj ŝtonoj, la amatoro estus avantaĝa, aŭ se kun 5 anticipe-metitaj ŝtonoj la profesiulo venkos.

Se iu amatora fortulo fanfaronas, "Mi venkis profesiulan 9 DANNulo kun iom da anticipe-metitaj ŝtonoj," oni devus intepreti tion, aldonante 2 ŝtonojn.

{Ordinaraj japanaj profesiuloj, kiam instruas amatoroj, kutime ludadas kun pli malmultaj anticipe-metigitaj ŝtonoj ol reale bezonitaj por egaligi la ŝancojn venki, kaj zorgante ne troe gajnu, pro ke ĝojigu la amatorojn.}